

la 17an de Dec. 1931

Kara Amiko

Grandan dankon por via ŝatata letero kiu multan plezuron al mi faris. Estas malofte ke mi leteron de vi ricevas + tio despli feliĉigas.

Ankaŭ ni korajn bondezirojn sendas esperante vin revidi en nia bela kapitalo - en 1932. Feliĉan Novjaron + ĝojan Kristaskon meze de via Edzino + de Eveto + ankaŭ de viaj kunkantantoj.

Esperu ke en Aoŭt¹ 1932 ne okazos io grava por ~~ne~~ malhelpi nian Kongreson kiel dum Aŭg. 1914!! Pro Hitler, la senlaboro, la bolĉevismo, Rusujo + financaj krizoj oni ne scias kien oni iras. Ĉio estas necerta en la estonteco. La falo de la angla funto estis terura surprizo + ĉiuj en Francujo suferos pro tio. Ni daŭras perdi + perdi monon - 70% de ĉio kion ni havas pro ~~pe~~ devaloro + ĉirkaŭ 100 000 mil frankojn pro bankroto, do tutege - senespere perditaj. Tio estas akra ĉar mia edzo tiel forte laboris + laboras + estas vere lacega.

Mi ensendas foton (malbone faritan) de la tri elpensintoj de nia flago.

Mi ŝategus iri Prahon pro la Sokola festo sed ne povos ĉar mia edzo laboros + estas tiel malproksime. Mi antaŭdankas pri la gazetoj ĉiam pleninteresaj kiujn vi povus sendi.

Nun, mi premas viajn manojn + vin.

Salutas amike + kore -----

Sincere + samidealane
Acie Sergeant

Se vi tiujn-ĉi fotojn jam havas
bonvolu resendi ilin.

¹ Aŭgusto